

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №8-9



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №8-9 (274-275)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 69-70.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №8-9 (274-275).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 сентября 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo 5

Jukka Pietiläinen. Duafoje en Seulo	6
Rezolucio de la 102a Universala Kongreso de Esperanto	8

Eventoj 9

Mireille Grosjean. ILEI: Ankaŭ instruistoj kongresis en Koreio.	10
Charlotte Scherping Larsson, Marc Konijnenberg, Koffitchè Koufionou. La unua IJK en Afriko: Granda sukceso!	13
La nova estraro de TEJO	16
Mireille Grosjean. Pont-Kunveno en la Parlamento de Suda Koreio	16
La unua sennacieca kongreso en Azio	17
Peter Baláž. SES sukcese komencis sian duan jardekon	18
Horst Vogt. Somera, tutsuna, gaja, juna etoso	20
Raita Pyhälä. BET-53 en la urbo, kie naskiĝas la vento	22
Radojica Petrović. REF: Niĉo de aŭtenta Esperantujo	24
Oldřich Arnošt Fischer. KELI: Fruktoj de la reformacio	25
Nikolao Gudskov. RET-2017 en la loko ne ensorĉita, sed ĉarma	26
Georgi Mihalkov. Inter-Fest sukcesa kaj impona	28
Kara An. IKEF: Ne plu fakgrupo, sed federacio	30
Doumont Valère. Verdaj Skoltoj tendumas kaj biciklas	31
Srećko Radulović. Boate kaj Esperante sur la rivero Kupa	32
Jérôme Caré, Noël Reysset. Denove en Pluezek.	32
Tri elstaraj fakuloj en Ĉaŭdefono	33
Halina Komar. Multkultura vilaĝo Esperanto	35
Povilas Jegorovas. Zamenhof-ekspozicio en Vilno	37
Nova honora membro de UEA	39
Novaj membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA	39
UEA diplomis ok elstarajn agantojn	41
Ralph Glomp. Hamburga Aŭtuno	41
La naŭa Amerika Kongreso okazos en Havano	42

Tribuno 43

Demisio en Roterdamo	44
Leterkesto	44
Paweł Fischer-Kotowski. Kien la movada gazetaro?	45
Xavi Alcalde. Tradicio kaj moderneco. 4. Pri la biblioteko Hector Hodler	50

Lernado de la rusa – interrete kaj pere de Esperanto.....52

Arkivo 54

Émile Boirac55

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en septembro 201757

Kulturo 58

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Marjorie Boulton forpasis59

Marjorie Boulton. La triopa memo59

Nikolao Gudskov. Fama klasikaĵo kun iom alia kaj nova enhavo (Recenzo: Lins U. *La danĝera lingvo*)60

Literatura Foiro, 2017, №28763

Ricevitaj libroj.....63

ESF lanĉas novan bultenon kaj revivigas alian64

Redakcie.....64

Rezultoj de la Belartaj konkursoj de UEA en 2017.....65

Halina Gorecka. Literatura konkurso *Liro-2017*.....66

Gazetoj ricevitaj en julio-aŭgusto 201766

Mozaiko 67

István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....68

Kiel aboni *La Ondo*.....69

Sur la kovropaĝo estas fragmento de la grupfoto de la 11a SES en Slovakio (vd. p. 18-19)

– unu el la plej sukcesaj eventoj de ĉi-jara Kongresa Sezono (Foto: Peter Baláž).

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Ne ĉiuj salonoj en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj
sufiĉis por scivolemaj kongresanoj (Foto: Anna Striganova)

Duafoje en Seulo

102a Universala Kongreso de Esperanto

Seulo, 22–29 julio 2017

Universala Kongreso de Esperanto okazis duan fojon en Koreio, same en Seulo, sed por mi Koreio estis tute nova sperto. Mi iom naive pensis, ke Koreio estas io simila al Japanio (aŭ Ĉinio, kvankam mi scias ke Japanio kaj Ĉinio tre malsimilas), sed montriĝis ke ĝi estas io tute alia, malpli tradicia, eble pli malfermita al la okcidento kaj al la mondo ĝenerale. Koreio estas tre modernigita socio, bone funkcia.

La kongresejo en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (universitato, kie eblas lerni diversajn lingvojn kaj kulturojn) estis bone funkcia, sed iom formaleca konstruaĵo de la universitato. La kongresejo okupis la teretaĝon kaj la trian etaĝon facile atingeblan per lifto aŭ piede, survoje frekventis koreaj studentoj. En apuda kafejo la kafo kostis pli ol tuta manĝo (kelkaj pladoj) en universitata manĝejo. Se preni ambaŭ kaj kompari la kunan prezon kun nordeŭropaj prezoj, la oferto estis akceptebla. Tamen multaj rezignis pri kafo en tiu kafejo. La manĝejo ĝenerale estis interesa sperto, unue necesis aĉeti manĝokuponon el aŭtomato, ja per eksterlanda kreditkarto sed nur per korea skribo, kaj poste preni manĝon ĉe kelneroj. Eblis uzi kaj bastonetojn sed ankaŭ forkon kaj kuleron.

El la estraranoj de UEA partoprenis nur kvar, kaj iliaj fotoj origine aperis en la kongresa libro, sed pro kutimo aŭ vanteco de estraranoj estis presita korekto-paĝo, kie aperis fotoj de ĉiuj estraranoj. Kiom tio kostis por UEA?

La plej ekzotika turisma celo eventuale estas la fermita landlimo inter la du Koreioj. La limo estis malfermita kaj limpasejoj funkciis dum pluraj jaroj, sed nun ĉio estas nur spektata de turistoj kiel restaĵoj de iu antikva civilizacio. Interese ke sud-koreoj konfiskis ĉion presitan, kio devenis el Nordo, eĉ bildlibrojn pri naturo, kiel malamikan propagandon. La konfiskaĵoj estis montritaj en vitrinoj de la limpasejo. Eblis ankaŭ spekti al la norda parto, sed videblis nur arbaroj kaj kampoj.

La libroservo havis malpli grandan ĉambron, tamen pli centran ol kutime kaj tial (ĉu vere?) ne necesis lasi sakojn al deponejo. Ankaŭ aŭtoraj duonhoroj okazis ne en la libroservo mem sed en apuda salono. Dum la ferma tago, kiam la libroservo kutime funkcias du horojn post la fermo, nun ĝi funkciis du horojn, sed dum la fermo. Tamen, laŭdire, estis klientoj ankaŭ tiutempe.

En la kultura programo pintis la nacia vespero, kiu ne estis enua prezento de unu grupo, sed vera kolekto el la korea kulturo de tradiciaj kantoj, el taekvondo kaj rokeca muziko. La bankedo estis vere luksa, sed trovi la lokon estis iom malfacile, ĉar eblis atingi konstruaĵon el diversaj flankoj, kaj la plej rekta vojo el bushaltejo aŭ



Foto: Anna Striganova

piedira vojo ne estis la plej simpla. Plej fidine estis sekvi la ĝeneralan direktoron. Pri urba akcepto eblas diri nur tion, ke malmultis la invitoj, kaj nenia onidiro pri la enhavo cirkulis poste.

Inter interesaj novaj aferoj estis ankaŭ la prezento de la aplikaĵo "Amikumu", kaj ĝia investa plano, kiu estas unu el malmultaj verkitaĵoj ankaŭ en Esperanto. "Amikumu" estas aplikaĵo, per kiu eblas vidi la plej proksimajn aliajn aliĝintojn. Tio certe donas novajn eblecojn por individua turismo per Esperanto, kaj ankaŭ por montri al dubantoj, ke troviĝas ankaŭ aliaj parolantoj de Esperanto proksime. En Internacia Kongresa Universitato aperis ankaŭ tre aktuala prelego pri solidareca agado pri migrantoj kaj rifuĝintoj en Eŭropa Unio. Interesus krome scii, kial IKU-libro ĉi-jare aperis en formo de luksa bindita libro, do sekve plikosta ol kutime, kaj eventuale malprofita por UEA.

La fermo estis sufiĉe kutima, krom ke la elektro paneis por deko da minutoj dum ĝi. Feliĉe, troviĝis tegmentaj fenestroj, kaj ne regis plena mallumo, sed eblis daŭrigi la programon preskaŭ sen interrompo. Poste venis la infanoj el infana kongreseto, entute 46, iu eĉ diris ke temas pri rekorda nombro, eble rekorda almenaŭ por Azio. Mi pli frue kredis denaskajn esperantistojn esti nur plejparte eŭropa fenomeno, sed ili ja abundas ankaŭ en orienta Azio de kie granda plimulto el tiuj infanoj ĉi-jare venis.

Movade la aferoj aspektis almenaŭ supraĵe en bona ordo, ĉar praktike mankis kritikaj demandoj ĉe kunsidoj, kie Centra Oficejo kaj Estraro respondas. Tamen en la Komitato de UEA la ĉefa diskuto temis pri la buĝeto kaj pri la granda malprofito, kiun la asocio havas pasint-jare kaj ĉi-jare, kaj laŭ prognozoj ankaŭ venont-jare. La buĝeto restis neakceptita kaj estos traktota per reta voĉdonado pli poste. Tute

mankis tempo por diskuti pri strategio kaj io tia, dum eĉ praktikaĵoj estis en malordo. La nova alternativa prezento de la buĝeto igis libroservon subite aspekti malprofita kaj la revuon *Esperanto*, eĉ kun la nuna membronombro, tre profita. Tamen temas pri tio, kiel estas dividita la mono ricevita el kotizoj. Laŭ mia kompreno libroservo devus esti proksima al ekvilibro, sed la revuo *Esperanto* signife malprofita. La ĉi-jara buĝeto estis farita ekvilibra per aldono de la giganta sumo 90 000 eŭroj el subvencioj, tamen malklaris, kaj neniu povis respondi, por kia sumo subvencipetoj estis entute faritaj, kaj por kiu celo estis petitaj la ricevitaĵoj kelkdek miloj da eŭroj.

Ankaŭ la Komitato fariĝis senkvoruma en la fina kunsido, ĉar pluraj komitatanoj foriris al la parlamentejo kie okazis pont-kunsido pri unuiĝo de Koreio. La revo de verŝajne ĉiuj koreoj, kio nun aspektas ne pli proksima ol pli frue. Jam la organizo de tia kunsido estis grava, krom ke partoprenis ankaŭ gravuloj de parlamento mem, interalie, la vicprezidanto de la Parlamento kaj du estroj de politikaj partioj. Krome aperis teksto-kolekto pri la temo senpage havebla en la kongresejo.

Fine de la kongreso estis anoncitaj eĉ du estontaj kongresurboj, nome en 2019 Lahti, Finnlando, kaj en 2020 Montrealo, Kanado. Ambaŭ estis kandidatoj jam ĉe pli fruaj konkursoj. Laŭ onidiroj, cirkulantaj en la kongresejo, UEA ankaŭ planas kongresi en Afriko, sed ne pli frue ol en 2024. El mia junaĝo mi memoras planon kongresi en Afriko jam en 1990.

Kaj fine, en Koreio eblis por la Esperanta teamo gajni la futbalmatĉon, kiu ĉi-jare okazis kontraŭ loka kvartala teamo, kiun la Esperanta teamo venkis je 1:0. Venontjare en Portugalio venko eble estas malpli facila.

Jukka Pietiläinen

Rezolucio de la 102a Universala Kongreso de Esperanto

Ni, 1174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio,

Volante kontribui al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017,

Diskutinte la temon “Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo” en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno,

Konstatante la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj,

Emfazante la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo;

Asertas la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn;

Invitas aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj;

Konfirmas la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.

Eventoj



Laŭ raportoj kaj rememoroj, eble la plej interesa inter la multegaj kongresoj kaj renkontiĝoj de ĉi-jara Kongresa Sezono en Esperantujo estis la unua Afrika IJK en Togolando.
(Foto: Peter Baláž)

ILEI: Ankaŭ instruistoj kongresis en Koreio

Al la 50a Kongreso de ILEI en Busano (Koreio) 196 personoj aliĝis, 170 alvenis; inter ili 20 unutagaj vizitantoj. La kialo estas la streĉita politika situacio tutmonda, kun du ŝtatestroj aparte neantaŭvideblaj. Pro tio kelkaj rezignis, kaj aliaj ne ricevis vizon. Ni menciuj la klason de Neĝeta el Ĉinio, grupon de 15 infanoj, por kiuj ni planis la infanan universitaton, kiu finfine ne okazis. Ok afrikanoj aliĝis kaj ne povis veni. Talenta junulo el Filipinoj same ne ricevis vizon. Finfine alvenis finna kolego, argentina junulo kaj vjetnama junulino.

La vojaĝo por eŭropanoj estis longa kaj kosta. Pro tio ili volis malkovri la regionon kaj multe ekskursis. Tion oni bone povas kompreni. La sekvo de tio estas, ke malmulte da personoj partoprenis la kursojn kaj la prelegojn. Ĉu pro la fakto, ke la temo estis turismo, la kongresanoj pli turismumis ol kongresumis...

La junulargastejo Arpina, deketaĝa moderna konstruaĵo, ebligis komunan restadon tage kaj nokte. Tio estas tre favora situacio kaj stimulas bonan etoson. La ĉambroj estis tre komfortaj, eĉ luksaj. La uzo de la tegmenta etaĝo la oka, faris de ni ok-ulojn. Tie estis eĉ surtegmenta teraso kun belega elvido al la maro; la kuraĝuloj iris tien kaj devis elteni la varmecon kaj humidecon. Ni havis kelkajn salonojn kaj larĝan koridoron por la libroservo, la akceptejo, la kaso kaj koridoraj babiladoj. Unu granda salono kun eblo dividiĝi en du ricevis la nomon de Lee Chong Yeong, fama korea esperantisto. En la dua etaĝo estas tre granda salono, kie okazis tri programeroj.

Du novaj programeroj aperis en tiu ĉi kongreso. La unua estas la Pedagogia Foiro. Laŭ la ĉeestantaj estraranoj ĝi estis sukcesa. Ses prelegoj okazis kaj donis la okazon al certaj personoj prezenti instrumaterialon, vortaron, novan lernolibron, la projekton "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano". La dua estas la Literatura Kafejo. En tiu programero Mireille Grosjean prezentis du svisajn librojn, kiuj estis tradukitaj al Esperanto: *Sonoril' Urĉjo* de Chönz (teksto) kaj Carigiet (bildo) kies originalo estas en la romanĉa lingvo, kaj *La Birdo* de Eveline Porter, kiu aperis en dulingva eldono: angla kaj Esperanta. La originalo estas en la franca. La dua literatura kafejo estis en la manoj de Rob Moerbeek; li prezentis verkon de Frederik van Eeden.

La kutimaj kursoj okazis: kurso por komencantoj sub la gvido de Annie Grente. Kurso por progresantoj sub la gvido de Sylvain Lelarge. La Instruista Trejnado, grava parto de tia kongreso, estis en la lertaj manoj de Katalin Kováts. Ok personoj sukcese frekventis ĉiujn partojn de tiu lertigado kaj ricevos atestilon. La gvidantoj ricevu niajn elkorajn dankojn.



Prelegoj okazis kaj konsistigis la paralelan programon, por tiuj kongresanoj, kiuj ne membras en la Komitato nek volas partopreni la supre menciitajn kursojn. La prelegoj sekvis pli aŭ malpli la kongresan temon pri turismo. Pro la malfruo aŭ neapero de diversaj prelegantoj tiu programo devis esti daŭre adaptata tra la semajno. Tamen la gvidantoj sukcesis ĉiam anonci la programon klare en la antaŭa tago.

La Komitato de ILEI kunsidis kaj atingis kvorumon danke al reta voĉdono antaŭa, kiu donis permeson al iuj komitatanoj anstataŭi komitatanojn de aliaj sekcioj. De la estraro ĉeestis la prezidanto, la vicprezidanto kaj la vicsekretario, nur 3 membroj, 3 virinoj. La Komitato elektis du novajn Honorajn Membrojn, nome la forpasintan Paul Gubbins el Britio kaj Hu Guozhu el Ĉinio. La Komitato aprobis la agadraporton kaj la finanĉan raporton kaj farante tion malŝarĝigas la estraron. Vigla diskuto okazis pri printado kaj sendo de nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* kaj de *Juna Amiko*. Gravaj decidoj okazis, kiuj devus kontentigi niajn membrojn kaj altigi la nombron de la abonantoj de *Juna Amiko*.

Nia ĉiujara evento fariĝas ĉiam pli riĉa, ĝia enhavo kreskas kaj variigas. La nombro de la partoprenantoj daŭre kreskas. Pro tio ni decidis en 2016 nomi ĝin Kongreso. El tio fontas, ke partoprenanto ne povas esti en ĉiu salono kaj ĉion sekvi.

Pluraj ekskursoj okazis dum la semajno. Du tuttagaj ekskursoj okazis merkrede.



Per buso 50 kongresanoj iris al Gyeongju kaj al la antikva templo Bulguksa. Ili havis la okazon restadi, mediti kaj manĝi en budhisma templo. Ili malkovris la templon Bulguksa, kiu estas mondheredaĵo de Unesko.

Menciindas la elstara kontribuo de Sinjoro Monto, unu el la membroj de la 11-persona Loka Kongresa Komisiono LKK. Li havas muzikan grupon kaj konas aliajn muzikajn kaj folklorajn grupojn. Li organizis, ke en ĉiu programero aperis iom da korea muziko: dum la frandvespero, dum la malfermo, okaze de la nacia vespero kompreneble, dum la lingva festivalo sur granda placo en la urbo. Danke al tio nia kongreso akiris viglecon kaj gajecon.

La bankedo okazis en fora restoracio, kiun la kongresanoj atingis per buso. Denove la busananoj fariĝis busanoj. Aŭdiĝis jena komento: la bankedo estis la plej sukcesa, tio estas abunda kaj bongusta, belaspekta kaj originala, kompare kun multaj aliaj dumkongresaj bankedoj. Kompletigis ĝin laŭtleĝado de etaj amuzaj tekstoj kaj poemoj kaj grupa ludo pri ĝeneralaj konoj.

Vendrede vespere ripetiĝis tre detala kaj interesa prezento de Iberio en rilato kun niaj venontjaraj kongresoj. Prelegis Duncan Charters, Ruben Fernandez Ascension kaj Mireille Grosjean.

Substrekindas, ke kaj la estraro kaj la LKK laboras volontule. Kiam partoprenantoj venas al ili kun postuloj, tio estas iom ĝena afero. La organizantoj ofertas servojn kaj helpon, sed postuli oni povas fari ĉe salajrita persono, ni tute ne estas en tia situacio. Kongresanoj en nia movado devas kompreni tion.

Kiam ni parolas pri instruado, ni pensas pri transdono de konoj kaj de kapabloj, klarigoj, ekzercoj... Tra la Jaro de la Lernanto ILEI klopodis montri la gravecon de respondeca lernado de la studento kaj nova akompana rolo de la instruisto. En Busano ni aŭdis la vortojn *instigo* kaj *emocioj*. La kunvivado de instruisto kaj de studentoj/lernantoj ankaŭ havas tiajn flankojn, al kiuj ni devas meti nian atenton. Instigo estas pli delikata nocio ol sugesto aŭ propono, sen paroli pri peto, postulo, devigo. Instigi estas montri per siaj propraj agoj, kio povas efiki kiel sugesto al aliaj. Povas esti flustrado de ideoj, faktoj, konstatoj. Emocioj ludas rolon en la rilato inter la instruisto kaj la lernanto; oni ŝatas la personecon aŭ ne ŝatas, oni ĝojas aŭdante amuzajn faktojn, la sindona instruado post bona preparado, adekvata komunikado en respektoplena etoso vekas admiron kaj pozitivan senton.

Mi ne aŭdis ian plendon. Mi mem vidis kelkajn paneetojn. Certe oni povas altigi la nivelon de la organizado. Sed ĝenerale ĉio disvolviĝis bone kaj kontentige. Por multaj kongresanoj tiu sperto esti en internacia renkontiĝo estis la unua. Ili esprimis sin tre pozitive pri tiu grava travivaĵo.

Per tri busoj la plej granda parto de la kongresanoj iris sabate matene al Seulo por partopreni UK-on. Kelkaj koreoj devis forlasi la eventon dum la semajno por iri al Seulo por labori por UK.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

La unua IJK en Afriko: Granda sukceso!

Tra la palmoj ĉe la strando en Aneho oni vidas la bluan ĉielon kaj la maron. Ĝi estas tuj apud la lernejo de la sanktuloj Petro kaj Paŭlo, nun plena da homoj en verdaj T-ĉemizoj. Tie ĉi-jare okazis la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Jam la unuan vesperon okazis spontana koncerto de nova afrika esperantista muzikisto Joel Muhire, kiu preparis por ni kantojn pri Esperanto kaj la temo de la ĉi-jara IJK: "Virinoj kaj viroj kaj siaj kulturoj". Postajn tagojn sekvis koncertoj de Jonny M kaj Kimo.

Kadre de la projekto "Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo" okazis trejnadoj, pre-paritaj de la trejnista teamo pri tiom diversaj kaj gravaj temoj kiel landa agado, gvidado kaj team-konstruado. Aliaj temoj estis praktika trejnado pri uzi ludojn por lerni. La kontraŭdiskriminacia trejnado estis rekte ligita al la temo de la kongreso. La populara trejnado por landa agado ebligis transdonon de scio kaj sperto pri kiel starigi landajn asociojn.

La komisiono pri landa agado de TEJO organizis la kampanjon kaj danke al la malavareco de esperantistoj libroj, revuoj kaj lernolibroj estis disdonitaj al aktivuloj el dek landoj. En la libroservo oni povis aĉeti librojn eldonitajn de afrikaj landaj sekcioj, kiel libroj kun tradiciaj rakontoj kaj vortaroj kaj tiel subteni la lokajn esperantistojn.

Unu de la ekskursoj estis al la lago, kiu donis al Togolando sian nomon. Estis homplena busvojaĝo al Lac Togo (Lago Togo), kiun ni trairis per pirogoj, lokaj lignaj kanuoj, por atingi Togoville. Tie ni vizitis katedralon, kaj en la centro de Togoville ankaŭ gravajn lokojn de vuduismo. Dum alia ekskurso ni vizitis unu lokan reĝon kaj lernis kiel lingvoj kaj kulturoj interrilatas. Ne nur en la ekskursoj tio estis prezentata, sed ankaŭ en la taga programo. Emocia momento estis la vizito de domo, kiu estis uzata por teni sklavigitajn homojn antaŭ forvojaĝo de Afriko. Malpli emocia, sed lernplena sperto, estis la vizito en ĝardeno kie estis arboj de kafo, kakao, gujavo, mango kaj papajo.

Estis kelkaj defioj por la organizantoj – ekzemple la buso por la ekskurso paneis kaj la taga programo devis esti ŝanĝita al alia tago. Ne ĉiu matraco estis komforta la unuan tagon, sed por tio la organizantoj ankaŭ trovis solvon. La ĉiutaga vivo en la kongresejo estis en si mem kultura sperto. Oni lernis, ke duŝi kaj necesejumi ne funkcias sen sitelo: Antaŭ iri necesejumi aŭ duŝi sin, oni devis plenigi sitelon sub la



Foto: Peter Baláz



Foto: Peter Baláz

akvokranoj, kunporti la plenan sitelon al la duŝejo/necesejo; en duŝejoj oni ĉerpis akvon per ujoj por lavi sin, en necesejoj oni rekte verŝis la akvon el la sitelo en la necesejo. Memkompreneble la partoprenantoj ĝuis ankaŭ la ĉeeston de multaj kuloj, kaj uzis kontraŭkulajn vualojn por pli trankvile dormi. Ĉiam estis homoj pretaj por pruntedoni kontraŭkulŝprucilon kiam iu forgesis ekzemple kunporti al ekskurso. La interreto estis sufiĉe bona por tiuj, kiuj aĉetis lokan SIM-karton.

Kulturaj spertoj estis ne nur en la ekskursoj. Okazis kultur-lingva festivalo (KLF) kun modo-spektaklo plena de tradiciaj vestaĵoj kaj dancoj kaj kun budoj, kie la landoj de la partoprenantoj estis reprezentitaj. Oni prezentis dolĉaĵojn, maldolĉaĵojn (Dankon pro la Marmite, Tim!), alkoholaĵojn. Ĉiuj landbudoj estis interese preparitaj, kaj post la memprezentadoj ĉiuj havis eblon gustumi multajn manĝ- kaj trinkindaĵojn. Nacia televido "TVT - Télévision Togolaise" kaj ankaŭ radio "Lumière" faris raporton pri la KLF.

Neniu estas tre surprizita legi, ke pluraj homoj malsaniĝis, tio ja estas la malpli bona flanko de vojaĝado. Dum la kongreso estis pluraj malĝojaj mienoj pro ventrodoloro kaj lakso, malgraŭ tio ĉi la etoso ĝenerale estis tiom bona, ke dum la

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Ĉi-tribune estas traktataj du gravaj kaj proksimaj temoj pri la produktado kaj disponigo de Esperanto-eldonaĵoj. Paweł Fischer-Kotowski revuas la ĉefajn nuntempajn primovadajn Esperanto-gazetojn kun aparta atento al la demando pri ilia papera/elektronika formo. Xavi Alcalde atentigas pri la problemoj de Biblioteko Hector Hodler, kiu havas nek elektronikajn eldonaĵojn, nek rete konsulteblan katalogon, kaj kiu estas uzebla nur surloke – en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. (Foto: Halina Gorecka)

Demisio en Roterdamo

La 17an de aŭgusto 2017 oficisto (kongresa asistanto) de la Centra Oficejo de UEA *Tobiasz Kaźmierski* (Polando) aperigis en sia Fejsbuka paĝo jenan deklaron:


«Hodiaŭ la Ĝenerala Direktoro de UEA ricevis mian **demisileteron**. Post preskaŭ naŭ jaroj en mia ofico, mi decidis ĉesigi la kontrakton kun la Asocio.

« Ĉi okaze mi ŝatus danki al tiuj, kun kiuj mi havis plezuron kunlabori: la kongresanoj, LKK-anoj, kongresaj helpantoj, membroj de UEA, miaj kolegoj en la CO kaj tieaj volontuloj.

« Mi esperas, ke la gvidantaro ne neglektos trovi taŭgan posteulon mian.

« Ĝis la revido en Lisbono!»

<https://www.facebook.com/tobiasz.kazmierski/posts/10212462345087242>



Leterkesto

Mi treege dankas vin pro la sendado de la revuo *La Ondo de Esperanto*; mi ricevis la julian numeron kaj jam volontege mi legas. Estas nekredebla la disvastiĝo de Esperanto en ĉiuj lokoj, pro tio la revuo estas tre grava, ĉar ĝi informas pri la Esperantistaj agadoj, do, mi konsideras bonan laboron.

Aliaflanke, en la sekcio “Kulturo” estus tre interesa scii pri artistoj kiel pentristoj kun iliaj pentraĵoj, ankaŭ pri la movado en Ameriko: ekzemple: renkontoj, asocioj kaj aliaj.

Fine, multe da enhavo kelkfoje lacigas la legantojn, do, mi pensas, ke la legadoj povus esti mallongigita iom, sen perdigi la riĉecon. Parenteze, mi ricevas la version “pdf” kaj “epub”, sed mi preferas la pdf-version.

Jennifer Dávila (Nikaragvo)

Mi dankas pro la sendita *Ondo* en pdf. Ekde kiam vi komencis sendadi ĝin en tiu sistemo, mi povas senprobleme ĝin malfermi kaj legi. Mi devas ankaŭ gratuli vin ambaŭ por la tre interesa enhavo kaj bonkvalita redaktado.

Janusz Sułżycki (Kanado)

Dankon pro la julia numero. Mi sukcesis iom malfacile tralegi la tuton, sed mi diras, ke vi ne devas ŝanĝi aŭ modifi ion. Mi daŭre kunlaboros laŭ miaj eblecoj kaj eble ni efektive vidiĝos en Poznano.

Renato Corsetti (Britio/Italio)

Mi preferas la epub-formon, tre bone legeblan laŭ preslitteroj k pro la indekso (facila artikol-elserĉo)... ankaŭ se mi ĉiam ŝatis vidi *LOdE* kiel pres-eldonaĵon! Pri la enhavo mi ŝatus multe da «kulturo», historion de Esperanto en Rusio, pri Tolstoj (en 2013) kaj aliaj eminentuloj kiel Verne ktp. Mi malpli legas recenzojn de libroj – ili multe utilas al grandaj legantoj... sed mi ne estas tia. *LOdE* – tre bela revuo!

Paolo Rottin (Italio)

Kien la movada gazetaro?

La merkato de periodaĵoj forte ŝanĝiĝas en la lastaj jaroj. Multaj gazeteldonejoj nuntempe forte tranĉas la kostojn – pro kio ofte suferas la kvalito – kaj ŝanĝas sian ekonomian modelon, provante trovi aldonajn enspezojn ekster la kutimaj vojoj. La proporcio inter abonkotizoj, pagoj de reklamoj kaj vendo de unuopaj ekzempleroj ŝanceliĝas, sed, plej grave, kutime en ĉiu el la kategorioj la sumo malkreskas. Por teni la negocon enspeza kaj la revuon debita, necesas pliaj ŝanĝoj.

Paŝon post paŝo – en la interreton

Pli kaj pli da revua enhavo aperas en la reto. En tio estas nenio nova. Diversaj gazetoj publikigis siajn artikolojn en la reto jam antaŭ dek aŭ eĉ dudek jaroj. Tiam, en la pioniraj tempoj, la komputilo (ĉar ne ankoraŭ telefono!) rolis kvazaŭ vitrino de gazetvendejo. La preterpasanto povis vidi la unuan paĝon, eble legi la frontan artikolon, foje “trafoliumi” la gazeton. La celo estis prezenti la enhavon kaj tenti la publikon aĉeti la “veran” gazeton. Nun la reta versio estas ofte neniel malpli “vera” ol la presita. Aŭ eĉ anstataŭas ĝin.

Pli kaj pli granda parto de la gazetoj estas havebla rete, kaj la legantoj ofte entute rezignas pri la presita versio. La eldonejoj provas – kun diversaj rezultoj – pagigi la retajn legantojn por la enhavo disponigita en la reto. En la komenca periodo de la interreto, ĉio publikigata en la Tut-Tera Teksaĵo estis principe senpaga kaj libere alirebla. Tio kutimis la publikon kaj kreis kvazaŭ regulon: se io estas en la reto, tio estu senpaga. Tial kaŭzas tiom da problemoj la nuna transiro al la sistemo en kiu la leganto pagas por la enhavo ricevata rete. Ĉar estas malfacile konvinki iun, ke tiu ekpago por io, kio ĝis nun estis senpaga, la gazeteldonejoj variigas kaj vastigas la oferton: en la reto aperas eĉ pli, inkluzive de la tuto, sed oni ja pagu por legi ĉi tion.

Serioza revuo en 2017 apenaŭ povas elturniĝi sen reta ĉeesto. Ĝi povas manifestiĝi en malsamaj manieroj. La plej kutima kaj plej malnova estas simple publikigo de iuj artikoloj, aŭ eble eĉ ĉiuj, en la formo de facile legebla teksto. Tiel okazas ankaŭ en Esperantujo: *Monato* publikigas la komencon de ĉiu artikolo (por legi la tuton necesas pagi la abonon aŭ atendi du jarojn, kiam la enhavo iĝas legebla senpage) kaj *La Ondo de Esperanto* publikigas elektitajn artikolojn en sia retejo *La Balta Ondo*. Iuj aliaj, por kiuj mi ne trovas ekzemplon en la Esperanto-movado, publikigas ĉiujn artikolojn, sed rajtigas legi nur kelkajn el ili (libere elekteblajn) en la sama aparato, necesas pagi por legi la pliajn (ekzemple por legi pli ol tri artikolojn semajne aŭ dek artikolojn monate ktp).

Se publikigi ĉion, kial ne publikigi tiel, kiel en la presita formo? Tio estas plej facila, ĉar ne postulas aldonan laboron kaj la reta leganto ricevas ekzakte la samon, kion la tradicia abonanto. En tiu formo – do, en la formato PDF – eblas legi ekzemple

la revuon *Esperanto*. Ĉiu individua membro de UEA povas konsulti la jarkolektojn ekde 2004 ĝis la kuranta jaro, tiuj ĝis la 35-a vivojaro povas same legi la revuon *Kontakto*.

Pli postula – pro la bezonata tempo kaj aldonaj elspezoj – estas kreo de aparta reta aŭ elektronika versio. La redakcio povas ebligi rete kvazaŭ foliumi la gazeton, do turni la paĝojn kiuj aspektas kiel en la presita eldono, sed post alklako sur la elektitan artikolon, ĝi aperas en formo pli taŭga por tralego en la komputila retumilo. Iuj gazeteldonistoj por pli grandaj titoloj kreas specialan aplikaĵon por tabulkomputiloj kaj saĝotelefonoj, en kiuj la legado estas pli intuicia kaj la enhavo “kompostiĝas” laŭ la grandeco de la ekrano en la uzata aparato. Tia aplikaĵo ofte havas aldonajn funkciojn, ĝi povas ekzemple sonorigi kiam aperas urĝa novaĵo aŭ arigi en unu loko ĉiujn artikolojn pri specifa temo.



Pli facila kaj malpli kosta estas kreo de ePub- kaj Mobidosieroj, kiuj faras la samon por la pli kaj pli popularaj bitlibrolegiloj (inter la plej famaj estas Amazon Kindle). Pri tio pioniris en Esperantujo Flandra Esperanto-Ligo, kun siaj libroj kaj la revuo *Monato* en PDF, ePub kaj Mobi. *La Ondo*, antaŭe havebla elektronike nur en PDF, ekde 2017 rezignis pri la papera eldono, sed vastigis sian elektronikan paletron per ePub. *Beletra Almanako* estas aĉetebla en la elektronika formo per Google Play.

Ke ne temas pri la definitiva fino de la papera gazetaro, sed ĝia aliformiĝo, pruvu la resurekto de la usona eldono de la fama semajna revuo *Newsweek*. Fine de 2012 aperis ĝia “lasta” papera numero. La gazeto transloĝiĝis komence de 2013 en la reton, sed ne multe pli ol unu jaron poste, en marto 2014, ĝi revenis al kutimaj gazetvendejoj. Cetere, rigardu tie: kiom da gazetoj pri novaj teknologioj troveblas? Tutaj bretoj da revuoj pri telefonaj aplikaĵoj, komputila programaro, kreado kaj administrado de retejoj. Ĉu ne estas ĝuste tiuj, kiuj devus malaperi kiel unuaj? Kaj estas ĝuste ili, kiuj nun progresas!

Tiuj evoluoj estas tre rapidaj, sed pro tio ne malpli interesaj. La eventuala stumblo de la eldonistoj ĉe tiu sojlo povas grave endanĝerigi la soci-ordon kiun ni konas. La ĵurnalistoj ne nur certigas al ni distron, ne nur liveras klaĉojn kaj veterprognozon, sed ankaŭ plenumas gravan rolon de la kontrolantoj de la registaroj, urbestroj, asociaj gvidantoj ktp. Tial libera kaj sendependa gazetaro estas piliero de demokratio – por bone fari sian laboron, ĝi devas trovi financadon. Ĉu vi pretas pagi?

En la rondo familia

Kiel menciite pli frue, ankaŭ en nia eta Esperanta gazet-merkato speguliĝas la tutmondaj procezoj. Tiurilate Esperantujo ne estas avangarda, sed ĝi postkuras la ĉirkaŭan realecon. Ŝanĝiĝas la legokutimoj de homoj, ankaŭ de esperantistoj, kaj

la Esperanto-gazetaro devas agordiĝi al la bezonoj kaj postuloj de la klientoj. Eble estus pli facile alfronti la defion se ne trudiĝus nun amaso da aliaj problemoj...

La ŝanĝiĝoj en la gazetaro ne estas subitaj, temas pri procezo – la abonombroj malgrandiĝas de jaro al jaro (tio ne rilatas al *Esperanto*, kiu nur en la lasta jaro – en unu jaro! – perdis 17% da pagitaj abonoj), la novaj manieroj prezenti la enhavon estas enkondukataj poioje. Tiuj ŝanĝiĝoj, en alia ritmo, tuŝas ankaŭ Esperantujon.

Kiu scias, eble jam post kelkaj jaroj la Esperantaj historiistoj kaj publicistoj traktos la jaron 2017 kiel limon en la rakonto pri la Esperanto-gazetaro? Pasis apenaŭ tri kvaronoj de la jaro kaj jam estas tiom da notindaj observoj! Ni rigardu de proksime la situacion pri la internaciaj movadaj revuoj.

Kvietiĝis la plendoj ĉirkaŭ *Esperanto*. La redaktora karuselo movita komence de la unua estraro de Mark Fettes impresas nun haltigita. La “geredaktoroj”, kiel oni nomas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, eble ne levis multe la nivelon, sed discipline observas la aperritmon. Kia ajn estas la revuo, nun ĝi almenaŭ aperas akurate – kaj ĉirkaŭ la grandaj malfruoj koncentriĝis la ĉefaj plendoj antaŭ unu jaro. Pri ĝia kvalito ne multaj jam zorgas. Sed manko de interesa, varia enhavo, klerigaj artikoloj kaj senriproĉa lingvaĵo trovos sian efikon en la daŭre falanta nombro de abonoj. Fine de 2016 *Esperanto* havis 2257 pagitajn abonojn, nur iomete pli ol duonon de la rezulto 10 jarojn pli frue, kiam ĝi ankoraŭ forte superis 4 mil pagitajn abonojn.



Mi ne kuraĝas aserti, ke ia mirakla pligrandigo de la abonantaro estas farebla – sed eble la falo ne devus esti tiom drasta? La revuo perdas la kutimajn legantojn kaj ne scias gajni novajn. Kio okazas pri la miliono(!) da lernantoj el Duolingo? Ĉu vere ne eĉ nur ĉiu centa el ili interesiĝas pri abono al *Esperanto* kaj membriĝo en UEA? Nur tiu 1% de la Duolinganoj estas jam kvaroblo de la tuta nombro de la nunaj abonantoj de *Esperanto*!

Por esti justa, pri la nuna situacio ne kulpas nur la nunaj geredaktoroj. Ili trovas sin ekde kelkaj monatoj en malfacila situacio kaj ĝis nun montris nur ke ili ne sukcesos multe ŝanĝi ĝin. Kion ili povas nun fari, estas la mildigo de la problemo per akurata aperigado de la revuo. La reala devo finfine “fari ion” kuŝas ĉe la estraro de UEA, sed ĝi fiaskis jam en kelkaj aliaj kampoj. Ĝi ne agas racie kaj efike – la esperoj, do, estu for! Fettes povas multe skribi en *Esperanto* pri daŭripova evoluo, sed estu certa, ke ne temas pri la evoluo de UEA.

La malforto de unu povus fortigi aliajn. Tiel estas ankaŭ nun – la neinteresa kaj malgraviĝanta *Esperanto* liberigas la spacon por sendependaj movadaj revuoj. Tiuj, kiuj malabonas *Esperanton* pro malkontento, povas ekaboni alian revuon. Ĉu?

Heroldo de Esperanto kun sia preskaŭ centjara historio, prestiĝo kaj pruvita tra



la jaroj sendependeco, kiu manifestiĝis en kuraĝo fingromontri al problemoj, estus natura kandidato... Montriĝis eĉ okazo por tio, ĉar la revuo komence de 2017 ŝanĝis sian eldonanton. La eksa raŭmismo posedanto pezigis la gazeton per sia ideologia linio kaj partiece, kiuj ne estis digesteblaj por multaj legantoj. Aliflanke la nova eldonanto, Fabrício Valle (komence ne sola, lia komerca partnero mortis en januaro), havis jam sufiĉajn okazojn por elmontri siajn entreprenajn kaj redaktajn mankojn.

Ne estas sciata kiom da personoj pagis la jarabonon por la “nova, moderna kaj enhavriĉa” *Heroldo* – tiu kostis 59 eŭrojn, la reta eldono: 29 eŭrojn – sed estas pli ol certe ke ĝi ne atingis la planatan nivelon de 3600 abonoj. Tiuj, kiuj tentiĝis al la promesoj de Valle, faris unu el la plej malbonaj moninvestoj en sia vivo. (Sed se la estraro de UEA povis en 2013 kaptiĝi je belaj vortoj pri avangardo kaj novelanismo...) Ili pagis preskaŭ po kvin eŭrojn por ĉiu paĝo! Krome, en la unu(nur)a numero kiu aperis, unu tutan paĝon el 12 okupis reklamo de la lingvo Esperanto mem, en la portugala lingvo. Tiu unua numero de la nova *Heroldo* ne estis tamen tute malbona – se mi povus ricevi tian gazeton ĉiumonate, mi certe konsiderus mem aboni al ĝi. Sed ĝi ne estas daŭripova.

La brazila eldono esence estis nova gazeto kun malnova nomo. Estis, ĉar kion ajn pli promesus Valle, la malnova posedanto anoncis publike nuligon de la vendo-kontrakto pro la nerespekto de la interkonsentoj flanke de la nova. Jarŝanĝe la gazeto revenos en la manojn de Giorgio Silfer. Ĉu li daŭrigos la eldonadon aŭ nur konservos la rajton je la nomo? Se la vickonsulo ne decidus sukuri la gazeton, ne estos li kiu enskribiĝas en la historion kiel tiu, kiu mortigis ĝin. Kaj eĉ se li emos ankoraŭ redakti *Heroldon*, ĝi ne plu estas triumfonta.

Du aliaj novaĵoj markas la jaron 2017. Januare enmondiĝis la unua numero de la nova “sendependa sezona revuo” kreita de Huang Yinbao (Trezoro) – *Tra la mondo*. Estas bizare, ke post la malapero de *El Popola Ĉinio* en 2000 la lando, kiu portas torĉon de unu el la plej malnovaj civilizacioj de la mondo, ne sukcesis liveri al la internacia publiko novan Esperanto-gazeton. Feliĉe, Trezoro inspiriĝis de la revuoj, kiujn li foliumis en Roterdamo en la daŭro de lia volontulado por la Centra Oficejo de UEA. Tre bone, staĝo en la CO ja devus sproni al aktivado kaj novaj kuraĝaj iniciatoj! *Tra la mondo* estas senpage elŝutebla el la reto kiel PDF-dosiero, sed ankaŭ la papera abono estas ebla (kontraŭ pago). Malgraŭ kelkaj kompostaj stumbloj la entrepreno meritas interesiĝon de vasta publiko, ĉar – kvankam internacia – ĝi ĵetas fortan lumon sur la grandan ĉinan E-movadon. Ekde la dua numero la gazeto eknestis ĉe la germana Interkultura Centro Herzberg. Dume la fondinto forte sin dediĉis al alia, ankoraŭ pli nova revuo...

... *Unesko-Kuriero*, la Esperanta eldono de la oficiala revuo de Unesko.



Aplaŭdinda estas la sukceso kolekti aron da volontulaj tradukantoj. La Unesko-aferoj interesas esperantistojn ekde jardekoj, tial ne estas dubo, ke la periodaĵo trovos sian niĉon en nia movado. Tamen, mia indulgemo rilate lingvajn kaj kompostajn erarojn estas en tiu kazo malpli granda, ĉar temas pri eldonaĵo sub la ŝildoj de Unesko kaj UEA. La malfruo de la dua numero estas ankoraŭ tolerebla, ĉar dume temas pri bagatelaj kelkaj semajnoj...

Laste sed ne balaste... La Ondo de Esperanto, por kiu la jaro 2017 estas revolucia, eĉ se ĝi ne trumpetas pri tio same kiel *Heroldo* faris pri si mem. Plena rezigno pri la papera eldono kaj salto en la interreton estas decido kuraĝa, sed ne naŭva.

En sia eseo *Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro* (2007) Aleksander Korĵenkov estis singarda pri la avantaĝoj de la retaj gazetoj, sed samtempe ne taksis – kiel iuj aliaj – la interreton malamiko de la tradiciaj gazetoj. Dek jarojn poste la gazeto kiun li redaktas aperas nur en la interreto. Mi ne estis inter la entuziasmoj de tiu ŝanĝo kaj mi daŭre paŭtas pri la nuligo de la papera eldono, eĉ se mi komprenas la faktojn malantaŭ tiu decido. Kvankam mem, portempa elmigrinto, mi legas ĵurnalon kaj semajnan revuon el mia devenlando nur en la interreto kaj mia librolegilo, *La Ondo* en tiu formo ne estas por mi same alloga kaj mi fakte legis la lastajn numerojn malpli atente ol mi faris tion antaŭ kelkaj jaroj. Sed tio estas nur miaj personaj preferoj kaj mian kapricemon la leganto povis percepti jam el la supraj alineoj.

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto, 2017, n°4



La fakto estas ke *La Ondo* kiel sola el la internaciaj movadaj Esperanto-revuoj ne cedas al paŭperismo, kiun mi ĵus priskribis. Tiom pli mi bedaŭras, ke estas ĝuste ĝi kiu malhavas la paperan eldonon kiel unua! Eĉ se tio metus ĝin en la avangardajn vicojn.

La adaptiĝo al la reta versio ne estis blinda – la PDF-versio estis modernigita, tiel ke ĝi ne similas la antaŭan presitan eldonon, sed estas kompostata kun la konsidero de la bezonoj de la ekran-legantoj. Okazis ankaŭ enhavaj ŝanĝoj – rilate ne nur la nombron kaj longecon de la artikoloj, sed ankaŭ la rubrikojn.

La elektronika *Ondo* estas iom malsama ol estis la presita, sed ankaŭ la presita eldono evoluis laŭ la jaroj kaj malgraŭ la nova formo, oni daŭre perceptas ke temas pri daŭrigo de la sama gazeto.

Al *La Ondo de Esperanto* mi deziras, ke ĝi ankoraŭ iam havu la paperan eldonon – eĉ se ĝi estus akcesora al la PDF-versio, same kiel antaŭ deko da jaroj estis inverse.

Paweł Fischer-Kotowski



La jarabono por 2018 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tradicio kaj moderneco

4. Pri la biblioteko Hector Hodler

Antaŭ kelkaj monatoj mi vizitis por la unua fojo la Centran Oficejon de UEA. Tuj mi estis kaptita de la libroservo kaj de ĝia respondeculo dum pluraj horoj. Ĉiuj aliaj oficistoj, kiujn mi trovis, estis ankaŭ ĝentilaj kaj helpemaj, inkluzive de la volont-ulinoj, sed ankaŭ de la direktorino, la KKS, la kongresa asistanto, ktp. Mi taksas ilin altprofesie kaj kontentas, ke ni havas taŭgajn kaj motivigitajn homojn en la centro de la ĉefa organizo de la movado. Kiel la ceteron de la artikolo, tiun lastan frazon mi skribis en majo kaj temis pri sincera miksaĵo de konstato kaj deziro el la vidpunkto de ekstera gasto.

Mia kialo por Roterdamumi estis konsulti la bibliotekon Hector Hodler. En la kadro de mia nuna esploro, mi bezonis malnovajn numerojn de konataj kaj malpli konataj revuoj. Enhave, la kolekto impresas. Jen vera juvelo por nunaj kaj estontaj esploristoj. Forme, ĝi ankaŭ impresas, sed malsame. Ĝi aspektas kiel neniu el la bildoj – temas pri la biblioteko en la jaroj 1923, 1935, 1937, 1963, 1985 kaj 2004 – kiuj aperas en la eseo prie de Ziko van Dijk en *La Asocio*.

Kvankam mi ne trovis ĉiujn materialojn, kiujn mi celis, el esplora vidpunkto la vizito estis profitdona kaj kontentiga. Pripensante la temon, almenaŭ tri aferoj plibonigindas. Unue, la katalogo. Ĝi plejparte konsistas el densa sliparo de libroj, revuoj, ktp... manskribita. Diri, ke hodiaŭ tiu sistemo ne estas tre praktika estus eŭfemismo. Bonŝance, Orlando Raola jam eklaboras pri ĝia ekciferigo, espereble li sukcesos. Tamen, malfacilas imagi, kial tiun laboron neniu faris ĝis nun.


Due, la enhavo de la biblioteko Hodler ne estas skanita. Sekve por konsulti ĝin oni nepre devas iri al Roterdamo. En la erao de interreto, mi pensas, ke eblus fari tion alie, almenaŭ pri la plej uzataj materialoj. Ekzemple, mi konsultis kelkajn numerojn de eta revuo *SenŜtatano* de la jardekoj 1940 kaj 1950. Mi komprenas, ke tiu revuo estas sufiĉe specifa. Tamen mi ankaŭ konsultis la revuon *Esperanto* de UEA de tiuj jaroj. Kaj tio ja povus (ĉu devus?) esti alirebla rete.

Trie, la riĉeco de la kolekto enhavas delikatajn dokumentojn, kelkaj el ili aĝas pli ol 100 jarojn. Tio ja valoras, sed ankaŭ danĝeras. Kiel sciante, se ĝi ne estas sufiĉe bone zorgita, papero disiĝas. Pro tio naciaj arĥivoj kaj bibliotekoj, kiel tiu de Aŭstrio, havas rigoran politikon tiurilate, kiu konsideras la temperaturon kaj humidecon de la ĉambro, ktp. En nia kazo, tio (ankoraŭ) ne okazas. Des pli la tempo pasas, ju pli la risko pligrandiĝas.

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antaŭ cent jaroj, la 20an de septembro 1917 en strangaj cirkonstancoj forpasis (spiritisme: “elkarniĝis”) profesoro Émile Boirac, unu el la plej eminentaj esperantistoj. Ĝuste al li Zamenhof proponis la prezidantecon de la unua esperantista mondkongreso en Bulonjo-ĉe-Marŝo (1905) kaj de la Lingva Komitato, fondita en ĉi tiu kongreso. Okaze de la centa mortodatreveno de rektoro Boirac ni publikigas artikolon pri li el la baldaŭ eldonota enciklopedio *Nia Diligenta Kolegato* (NDK), kiu entenas biografiajn artikolojn pri ducent elstaraj esperantistoj.

Émile Boirac

Boirac, Augustin Émile [bŭarák]. Franco. Nask. 26 aŭg 1851 en Guelma (Alĝerio). Filo de negocisto Jean Boirac k ties edzino Feline Salvate-Portan. Studis filozofion k literaturon en la Bordoza Universitato, bakalaŭriĝis pri literaturo (1872), agregaciĝis pri filozofio (1874), doktoriĝis pri filozofio (1894) per la tezo “La ideo de fenomeno”. Ekde 1871 dum 26 jaroj instruis filozofion en francaj liceoj, fine en la renoma liceo Condorcet (1882-97). Profesoro pri filozofio k rektoro en la universitatoj de Grenoblo (1898-1902) k en Diĵono (Akademio de Diĵono, 1902-17). Membro-korespondanto de la Franca Akademio de Sciencoj Moralaj kaj Politikaj (1906).



En 1876 proponis la terminon “*déjà vu*” k iĝis konata fakulo pri paramnezio. Studis hipnozon (en 1911 premiita de la Akademio de Sciencoj), praktikis ĝin k spiritismon. Kun aliaj fakuloj esploris la mediumajn kapablojn de Eusapia Palladino. Aŭtoro de pluraj sciencaj, didaktikaj k popularaj verkoj (*Baza kurso de filozofio*, 1892; *La ideo de fenomeno*, 1894; *Lecionoj de psikologio aplikata al edukado*, 1902; *Kurso de moralo por normalaj lernejoj*, 1905; *Nekonata psikologio*, 1908; *Estanteco de la psikaj sciencoj*, 1917 k. a.). Fondinto de la Elektroteknika Instituto en Grenoblo k de la Instituto pri Vino en Diĵono. Prezidanto de la mikologia societo en la dep. Côte-d’Or, aŭtoro de kuir-receptoj. Kavaliro de Honora Legio (1906).

En 1885 edziĝis kun Baptistine Rose Joséphine Bertrand (1859-1917); kvar infanoj (unu el ili, subleŭtenanto Émile Lucien Élie Boirac, naskita en 1890, batalis en fronto ekde la komenco de la Unua Mondmilito k mortis pro vundoj en majo 1915). Kvin monatojn post la forpaso de sia edzino (21 apr 2017) Boirac mortis 20 sep 1917 en Salses (dep. Pyrénées-Orientales) en malklaraj cirkonstancoj (Laŭ unu versio: dum spiritisma seanco; laŭ alia versio: per sia propra decido, perdinte la emon al la vivo.). Entombigita en Salces, 6 okt 1917 resepultita en Diĵono. Unu el la stratoj de Diĵono havas lian nomon.

Esp: 1900 (Adresaro, N°5777) danke al la matematikisto Charles Méray. Aktive propagandis Eon; post liaj prelegoj fondiĝis E-grupoj en kelkaj urboj. Enkondukis Eon en la programon de eksterlandaj studentoj en la Diĵona Universitato.

Verkis k tradukis kelkajn librojn en/pri Eo, okupiĝis pri leksikografio, kompilis tri-voluman vortaron Eo-Ean, kunlaboris en *L'Espérantiste*, *La Revuo*, *Oficiala Gazeto E-ista* k aliaj E-gazetoj. Prezidis la 1an UK en Bulonjo-ĉe-Maró (1905) k kun-redaktis kun Zamenhof la kongresan protokolaron. Membro de KKK. Elektita de Zamenhof kiel prezidanto de LK (1905). Membro de la Komitato de la Delegacio por Akcepto de Internacia Helplingvo, kiu 24 okt 1907 en lia foresto (lin anstataŭis Gaston Moch) akceptis principe Eon kun ŝanĝoj efektivigotaj de la Konstanta Komisiono de la Komitato de la Delegacio interkonsente kun LK. Dum la Ido-krizo (1907–08) komprenis, ke la centpersona LK ne estas laborkapabla k proponis fondi ties gvidorganon en la formo de Akademio, kies unua prezidanto li iĝis (1908-17). En 1912 kunfondis Mondan Asocion de Spiritismaj E-istoj kaj iĝis ĝia unua prezidanto.

V Leibniz G.-W. *Monadologio* (Tr., 1902); *Ŝlosileto kvarlingva franca, angla, germana, latina de la lingvo internacia Esperanto* (1903); *Perdita kaj retrovita* (1904); Molière. *Don Juan aŭ la ŝtona festeno* (Tr., 1905); *Qu'est-ce que l'espéranto?* (1906); *Le Congrès espérantiste de Genève* (1906); *Pri la homa radiado* (1906); *Tria Kongreso – Festo de La Revuo* (1907); Van Dyke H. *La kvara mago: aŭ la alia saĝulo* (Tr., 1909); *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca* (1909-10); *Le problème de la langue internationale* (1911); *Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto* (1911); *Fundamentaj principoj de la vortaro Esperanta* (1911).

B EdE, p. 57-58 k. a.; LZ, Vol. 1, p. 7-8 k. a.; OVP, p. 36. Condette J.-F. *Les recteurs d'académie en France de 1808 à 1940. Tome II, Dictionnaire biographique*. Paris, 2006, p. 76-77. S-ro Émile Boirac (OGE, 1917-1918, Nº7-8); Delcourt M, Amoureux J. *Filozofo kaj esperantisto (Eo, 1977, Nº11)*; Amoureux J. *Émile Boirac* (LG, 2011, Nº154).



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonantoj: Sezonoj kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en la fino de la Zamenhofa Jaro 2017

Prezo: 30 eŭroj

Jam antaŭmendebla kontraŭ 25 eŭroj

Jubileoj kaj memordatoj en septembro 2017

3. Antaŭ 80 jaroj estis pafekzekutitaj **Ilja Jefimoviĉ Izgur** (1881-1937) kaj **Viktor Moisejeviĉ Kolĉinskij** (1904-1937), ukrainiaj judoj kaj esperantistoj, kunkompilintoj de la 720-paĝa *Granda Rusa-Esperanta Vortaro* (1931).

9. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Albert Steche** (1862-1943), germana entreprenisto, politikisto kaj esperantisto, propagandisto kaj mecenato de Eo, aŭtoro de pluraj artikoloj, prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio (1920-25).

10. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Stasys "Staseo" Gaidamavičius** (1947-2008), litova inĝiniero, kamenfaristo kaj esperantisto, aŭtoro de *100 demandoj kaj respondoj pri Esperanto* (1977) kaj *Litovaj-Esperantaj konversacioj* (1994), aktivulo de SEJM kaj estro de ties magnetofona servo, redaktoro de la "samizdata" (eksterleĝa) bulteno *Kurte* (1979-82), kiun (kaj multajn aliajn samizadataĵojn) li mem multobligis.

13. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Canko Ignev** (1922-2014), bulgara teatra aganto, direktoro de la Armea Teatro en Sofio kaj esperantisto; aŭtoro kaj tradukinto de pluraj libroj, interalie, de *Ŝtonamaso* (1995) de Ivan Vazov, fondinto kaj gvidanto de la fondaĵo "Socio kaj Esperanto", redaktoro de *Enciklopedio de E-movado en Bulgario* (neeldonita).

13. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Aleksandr Borisoviĉ Ŝevĉenko** (1957-2012), rusa inĝiniero, ĵurnalisto kaj esperantisto, fondinto (1992) kaj direktoro de la eldonejo *Impeto*, redaktoro de *Moskva Gazeto* (1990-95), kompilinto de *Rusa-Esperanta vortaro* (2004), *Esperanta-rusa vortaro* (2006), *Ilustrita enciklopedio de akvariaj fiŝoj* (2007), *Rusa-Esperanta biblia frazaro* (2009).

19. Antaŭ 5 jaroj mortis **Zofia Banet-Fornalowa** (1929-2012), pollanda judino transvivinta Holokaŭston, instruistino de historio kaj esperantistino; aŭtoro de pluraj artikoloj kaj de kelkaj libroj pri la Esperanta teatro kaj pri la historio de Esperanto, inkluzive de *La familio Zamenhof* (2000), gvidantino de la teatra grupo *Espero*, en kiu ĉefrolis ŝia edzo Jerzy Fornal.

20. Antaŭ 100 jaroj mortis **Émile Boirac** (1851-1917), franca filozofo, profesoro kaj rektoro de la universitatoj de Grenoblo (1898-1902) kaj Dijono (1902-17), eminenta esperantisto, prezidanto de la 1a Universala Kongreso de Esperanto (Bulonjo-ĉe-Mar, 1905), la unua prezidanto de la Lingva Komitato (1905-17) kaj de ties akademio (1908-17), kunfondinto kaj la unua prezidanto de la Monda Asocio de Spiritismaj Esperantistoj. Aŭtoro de *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca* (1909-10). (Vd. p. 54-56).

22. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Julia Isbrücker** (1887-1971), nederlanda esperantistino, membro de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (1926-33), kunfondinto de la Internacia Cseh-instituto (1930) kaj de la Universala Ligo (1942), kiun ŝi reprezentis en internaciaj mondfederistaj kongresoj, aŭtoro kaj tradukinto de kelkaj libroj en Esperanto, edzino de Johannes Isbrücker (prezidanto de Akademio de Esperanto, 1948-63).

Kompilis **Aleksander Korĵenkov**

Kulturo



Kiam ĉi tiu numero de *La Ondo* estis finredaktata el Anglio venis trista informo: la 30an de aŭgusto forpasis la plej granda Esperanta poetino Marjorie Boulton (1924-2017).

Marjorie Boulton forpasis

La 30an de aŭgusto 2017 en la aĝo 93 jaroj forpasis Marjorie Boulton (1924–2017), instruistino de la anglaj lingvo kaj literaturo, doktoriĝinta en Oksfordo (1976) per disertacio pri la romanisto Charles Reade. Ŝi verkis angle poemaron, literaturologiajn librojn, tradukis kelkajn verkojn en la anglan, sed sian famon ŝi akiris kiel la plej granda poetino kaj dramverkistino en Esperanto.

Lerninte Esperanton en 1949, ŝi jam en 1951 verkis en ĝi sian unuan poemon, ekde 1952 ricevis 22 premiojn kaj laŭdajn menciojn en la Belartaj Konkursoj de UEA pro poemoj, prozaĵoj kaj teatraĵoj. Ŝia unua poemaro *Kontralte* aperis en 1955, sekvis pliaj poemaroj, dramlibroj kaj nefikciaj libroj, interalie, biografioj de Ludoviko Zamenhof (en Esperanto kaj angle) kaj Julio Baghy. Ŝiaj verkoj estas tradukitaj en la anglan, hungaran, italan, kroatan, japanan, litovan, polan, portugalan, rumanan, slovenan, ukrainan kaj vjetnaman lingvojn. La Esperanta PEN-Centro kelkfoje proponis ŝin kiel kandidaton por la literatura Nobel-premio. Ŝia progresiga legolibro *Faktoj kaj fantazioj* (1984) estas unu el la plej multe venditaj libroj en la libroservo de UEA.

Marjorie Boulton estis membro de Akademio de Esperanto dum 50 jaroj ekde 1967 (la plej longtempa akademianeco inter la nunaj akademianoj). Dum pli ol 30 jaroj ŝi estis prezidanto de Rondo Kato / Esperantista Kat-Amikaro. Honora Membro de UEA (1985); laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME (1998), de la premio Degučĭ (2004) kaj de la premio de la Fondaĵo Grabowski (2014).

Ni funebras kaj kondolencas.

**Halina Gorecka,
Aleksander Korĵenkov**



Marjorie Boulton

La triopa memo

Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
De l' dramo primitiva ŝi prelegas.
Dume, en koro, primitiva dramo
Okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
Sub nigra robo brulas nun pro amo
Virino simpla en dezir' tortura.
La lektorino pensas. La virino
Baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet', per arta disciplino,
Observas ilin ambaŭ, kaj komentas.

Fama klasikaĵo kun iom alia kaj nova enhavo

Ulrich Lins. *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*: Nova, reviziita eldono. Rotterdam: UEA, 2016. 375+24p.

La libro de Ulrich Lins *La danĝera lingvo* havas longan historion. La unua versio aperis en 1973, malgrandkvante eldonita kiel broŝuro ĉe la eldonejo *L' omnibuso* en Kioto. Unu jaron poste ĝi fariĝis ĉapitro en la epokfara paradigmeca verko *Esperanto en perspektivo*. Post 13-jaraj esploroj ampleksa kaj renovigita versio aperis en 1988 en la eldonejo *Bleicher* (Gerlingen, Germanio) – tiel UEA maskis sian partoprenon en la eldono, por ne inciti sovetaĵajn aŭtoritatojn.

Sed en tiu momento la epoko ŝanĝiĝis, kaj jam en 1990 represo (kun aldonaj komentoj de Detlev Blanke kaj Sergej Kuznecov) aperis en Moskvo ĉe la eldonejo *Progreso*. Poste venis tempo por tradukoj al naciaj lingvoj – la japana (1975, de la unua broŝurforma eldono), germana (1988), itala (1990), rusa (1999), litova (2005), korea (2013), angla (2016, jam de la nova eldono).

En 2016 (sur la kopirajto tamen estas indikita 2015) aperis ĉe UEA nova, reviziita eldono. Ĝi signifoparte ripetas la eldonon de 1988, sed samtempe ĝi havas kelkajn gravajn diferencojn.

Do, pri kio temas la libro? Ĝi estas “Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto”, diras la subtitolo. Fakte, temas pli pri persekutoj kontraŭ esperantistoj, ol pri persekutoj kontraŭ la lingvo mem, sed distingi inter iuj fenomenoj estas ne ĉiam facile – ja la lingvo ekzistas nur per siaj portantoj... En ĝi estas prezentitaj kaj simplaj burokrataj malhelpoj por disvastigi la lingvon, malpermesoj ĝin uzi, kaj persekutoj kaj reprezalioj kontraŭ esperantistoj. Iuj tiaj eventoj, kiel malpermeso de propagando, okazis ankaŭ en “demokratiaj” landoj (kiel en Francio en la 1920aj), sed ĉefe en la landoj, kiujn oni nomas totalismaj – unuavice, en la Hitlera Germanio kaj en la



Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa postkongresa Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Literatura konkurso *Liro*-2017

La redakcio de La Ondo de Esperanto denove invitas al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Same kiel en la du lastaj jaroj, ankaŭ en 2017 la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.

Por *Liro*-2017 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: *To the Man on the Trail* – novelo de Jack London;
2. Traduko el la rusa: *Obruĉ* – novelo de Fjodor Sologub.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*:

<http://esperanto-ondo.ru/lnd-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn aŭ komputile kompostitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la retadreso sezonoj@yahoo.com.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 31a de decembro 2017.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2021 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de Jack London aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*-2017

Gazetoj ricevataj en julio-aŭgusto 2017

Dia Regno, 2017/3; Esperanta Finnlando, 2017/3; Esperanto, 2017/6,7-8; Esperanto aktuell, 2017/3; Kontakto, 2017/2; La Eta Heroldo de KCE, 2017/3,4; La Lanterno Azia, 2017/344,345; La Revuo Orienta, 2017/7; La Sago, 2017/115,116; Literatura Foiro, 2017/287; Monato, 2017/6,7; Norvega Esperantisto, 2017/3; Scottish Esperanto Bulletin, 2017/2; Sennacieca Revuo, 2016-2017/144-145; Sennaciulo, 2017/3-4; Tempo, 2017/129.

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Mola mesaĝo

Venontan dimanĉon argentinaj esperantistoj kolektiĝos antaŭ la Obelisko <...> por disvatiĝi pri la Esperanto-tago... (Ro Sartoro, yahoo-grupo informado, 21 jul 2016; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff).

Barbaraj barbiroj mondomeze

“vortoj de... Elie Wiesel: ‘Kie ajn viroj au virinoj estas persekutitaj surbaze de sia razoj <...>, tiu loko devas <...> iĝi la centro de la universo” (Francesco Maurelli, 20 aŭg 2017, <https://www.facebook.com/franmau/posts/10155578244409144?pnref=story>).

Ne ekestas amazona roto

<...> konceptoj tiel universale akceptitaj, ke ilin ripeti ne donas kroman informacion... (Carlo Minnaja: *Tridek jaroj da saĝo*, *Monato*, 2003, N°7, p. 31, <http://www.esperanto.be/fel/2003/008022.html>)

Mama zono de amazono, aŭ: La brusta metodo?

La sabato komenciĝis per manlaboro kun Paŭlina kaj lingvokurso de mama Jana... (Michaela Stegmaier: *La 4-a Centrejo en Bartošovice*, *Esperanto Aktuell*, 2017, N°3, p. 29; indikis Lu Wunsch).

Trakuras viajn tubojn

[EDU]-Novaĵoj: Edukado.net jam de 15 jaroj en via sevo (amasmesaĝo de Edukado.net, 15 dec 2016; trovis Russ Williams).

Neniel dekadenca

La plej solena programero de la seminario iĝis la honorigo de la dukadenco prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis... (*La Ondo de Esperanto*, 2017, N°6, p. 27).

Stile nudas la reĝon

Viktor Orban... reagis troigite post liaj evidentaj sukcesoj kaj lia reĝstilo nun minacas forgliti en aŭtoritatismo. (Eugen Macko, *FREŜO*, 2017, N°6, p. 8).

Zamenhof tempojaĝas

... rapida trarigardo de ĉerpaĵoj el la verkoj de Zamenhof ... Deklaracio pri Homaraniismo (2013)... (Maria Rosaria Spanò: *Antaŭparolo*, *Jarlibro 2017* de UEA, p. 7).

Arbaraj specioj

<...> li vidis, ke la gepatroj kaj la homoj sidas en senarbejo <...> (Julian Modest: *La perdita domo*, *Beletra Almanako*, 2017, N°29, p. 27).

Plukis **István Ertl**

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

aŭspicioj



komunikiloj



Pola
Esperantisto



33 ARKONES

22-24 SEPTEMBRO 2017
POZNANO, POLLANDO

WWW.ARKONES.ORG

★ e-senco

